R.A.D.E. INFORMILO

ROTARIA AMIKARO DE ESPERANTO

Numero 38 majo 2017

Karaj RADE-anoj,
Malgraŭ multe da laboro de Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, kiuj estas preparantaj la novan esperantan rotarian klubon en Brazilo, kaj de Jozefo van der Vleugel, kiu finlaboras la publikigon de la bildstrio de Paul F Harris en la italan, ni kapablis redakti la 38-an numeron de nia informilo. Bonan legadon.

KONGRESOJ, KONFERENCOJ, RENKONTOJ

1. UK en Nitra (Slovakio)

Dum la movada foiro en Nitra, multaj RADE-anoj entuziasme interkonatiĝis kaj babilis ĉe la RADE-stando pri siaj diversaj kluboj al kiuj ili apartenas. Dum la kongres-semajno ili plurfoje kunvenis por amikaj renkontoj kaj oni povas konstati, ke membroj en tradiciaj kluboj, kiel Christoph Klawe en Germanio, aŭ Jozefo el Belgio ne virtuale elektronike sed tre konkrete kaj fizike interŝanĝis ideojn pri siaj kluboj.

Sed la plej signifa evento de RADE anoj en Nitra estis kiam ĉiuj kongresanoj, kiuj membras en Rotary, kunvenis por amika vespermanĝo. La 1-a prezidanto de la Rotary e-club Esperanto en Italio, distrikto 2050, ricevis la distingon PAUL HARRIS FELLOW, kiun la Klubo decidis donaci al Davide Astori pro sia kuraĝa iniciato prezidi, post multaj malfacilaĵoj, la unuan rotarian klubon, kiu uzas nur esperanton en siaj kontaktoj.

Almenaŭ 6 RADEaj membroj estas parto de tiu ekskluziva grupo ***Paul Harris Fellow***, kies specialan distingon oni ricevas pro signifaj agadoj kaj donacoj favore al Rotary.
Ĝenerale kluboj kolektas la sumon de mil dolaroj por la Rotary Fondaĵo kaj sekve donacos la premion al iu, laŭ la Klubo, meritan personon.

2. UK en Seulo (Koreio)

UEA Universala Kongreso en SEOUL, Koreio

Dum la venonta UK de Universala Esperanto Asocio en Koreio, urbo Seulo, RADE preparas sian standon por kunigi rotarianojn, kiuj parolas esperanton. La standon gvidos nia kara amiko Leif Nordenstorm el Svedio, 2-a prezidanto de la ítala Rotary eclub Esperanto. Eble ne multaj rotarianoj partoprenos tiun foran kongreson, sed certe tie estos niaj membroj Jungkee LEE, Leif Nordenstorm, Sara Spanó kaj Francesco Maŭrelli.
La redakcio de nia bulteno atendas raporton post la Universala Kongreso por publikigo!

3. Distriktaj konferencoj de Rotary International

CONFERÊNCIA DO DISTRITO 4560
18 a 21 de maio de 2017
Poços de Caldas/MG

Inter aprilo kaj junio estas la periodo dum kiu ĉiuj Rotary distriktoj en la mondo (535) organizas sian konferencon, difinitan kiel la festo plej granda de la jaro.
Delegacio de RADE-membroj estas survoje al la urbo Poço de Caldas en Ŝtato Minas Gerais, kie okazos la konferenco de distrikto 4560 dum la tagoj de 18, 19, 20 kaj 21 de majo. Distrikto 4560 patronas la kreon de la " *Rotary Club de Esperanto Brasil"* danke al la apogo de nia membro Joâo OtávioVeiga Rodrigues, Guberniestro de tiu distrikto.
Ĝuste dum la Konferenco en Poços de Caldas, ni ricevos la oficialan diplomon de RI por la nova klubo!
En la programo de la evento, sabaton 20 de maio la guberniestro João Otávio Veiga prelegos pri la rolo de la ***Amikaroj en Rotary***, temo kiu aparte interesas al RADE.

4. Vizito de nia ĝenerala sekretario John Hewko en Bruselo

Nia prezidanto de RADE partoprenis en tiu oficiala kunveno, kiu okazis en la salonoj de la belga ministerio de eksteraj aferoj. Estis okazo renkontis klubojn el Belgio, Nederlando, Luksemburgio kaj Francio.

DIVERSAĴOJ

1. Nia amikaro en UEA aŭ faka agado en la esperanta movado

Pri *" Esperanto kaj fakaj asocioj hieraú kaj morgaú*", aperis artikolo en la esperantista gazetaro.
Laú opinio de Amri Wandel, kiu estis estrarano de UEA pri fakaj asocioj en la periodo

de 1995 ĝis 2013, la nuntempa stagnado de la Fakaj Asocioj dependas de la malnoviĝo de la tradicia modelo de asocio, kun membroj, jarkotizo kaj bulteno, sen konsideri la populariĝon kaj disvastiĝon de la nova komunik-maniero inter personoj kaj grupoj kun specifaj interesoj kaj komunaj temoj.
Tiu kritiko ne rilatas al RADE, kiu de jaroj funkcias elektronike kaj senpage. Cetere RADE estas la nura faka asocio registrita inter la 65 fakoj de UEA kaj samtempe inter la pli ol 60 Amikaroj (Fellowship) de Rotary, kun la samaj celoj de Amikeco kaj Paco inter la Nacioj.
Kio mankas al nia RADE , estas pli nombraj geamikoj motivigitaj pri nia fundamenta celo, disvastigi Esperanton inter Rotarianoj kaj Rotary inter Esperantistoj!
Tiun celon RADE klopodis realigi " de supre", per du rezolucioj vane prezentitaj al la Leĝo-Fara Konsilantaro de Rotary, ĝis kiam ni komencis sukcesan agadon " de malsupre", per la starigo de du Esperanto e-kluboj de Rotary ,kiuj funkcias elektronike en Esperanto kun membroj en diversaj landoj kaj realigo de konkretaj projektoj kaj programoj, kiujn oni jam detale prezentis en la RADE-Informilo n.37.
Ĉar ekzistas en la mondo pli da Esperantistoj ol da Rotarianoj, ekzistas la potenciala ebleco multobligi la e-klubojn de Rotary en Esperanto, kiel solvo de la lingva problemo, kiun la tutmonda movado de Rotary alfrontas nuntempe, kvankam ĝi permesas 12 oficialajn lingvoj. Tamen en la miloj da kluboj la rotarianoj uzas ĉiusemajne pli ol 100 diversajn lingvojn. **Do, ke ni esperanton parolantaj rotarianoj donu novan ekzemplon, estas esenca!**

2. Rotariano en Pollando

Dum vojaĝo en Pollando nia prezidanto malkovris statuon de fama rotariano el Pollando ... (https://eo.wikipedia.org/wiki/Jan_Karski).

Bedaŭrinde li ne estis membro de RADE. Tamen mi pensas ke ekzistas forgesitaj membroj de RADE aŭ forgesitaj rotarianoj kiuj parolis EO. Ĉu vi konas J.D. Applebaum (https://eo.wikipedia.org/wiki/Jakob_David_Applebaum)

3. Kunlaboro de rotarianino.



Joëlle Palmaerts (rotarianino de la rotaria klubo Louvain-la-Neuve distr. 2170 Belgio) volonte akceptis helpi RADE por la la publikigo de la itala bildstrio pri

Paul Harris. Ŝi finlaboris la PDF dosieron.

Membriĝu senkoste en nia amikaro, se vi apogas niajn celojn,
kiuj kongruas perfekte kun la kvar etikaj principoj de Rotary!
Se vi apogas tiujn ideojn, partoprenu en nia grupo!

1. Nomo …….
2. Rotaria Klubo kaj Distrikto ……
3. Urbo kaj Lando ……
4. Adreso ……..
5. Telefono kaj retpoŝto ……
6. Profesio……
7. Respondecoj en Rotary ……
8. Esperanto parolanto ek de kiam …… Rotariano ek de kiam ……..
9. Parolataj lingvoj……
10. Laŭvolaj pliaj informoj……
11. Dato kaj subskribo ……

R.A.D.E. Rotaria Amikaro de Esperanto

La Estraro de ROTARY INTERNATIONAL stimulas la rotarianojn kun komunaj interesoj pri profesiaj, humanecaj, kulturaj aŭ distraj aktivecoj starigi neformalajn grupojn por realigi la celojn de RI.

La grupo RADE, konsistanta el rotarianoj, kiuj uzas kaj apogas la internacian lingvon Esperanto, celas realigi la idealojn de ROTARY INTERNATIONAL por Interkompreno, Amikeco kaj Paco inter la nacioj, faciligi la personajn kontaktojn inter Rotarianoj de malsama lingvo-deveno kaj disvastigi la humanecajn internaciajn servojn de RI.

Estraro

Honora Prezidanto: Eskil Svane (Svislando)
pouzasco@gmail.com
Honora Prezidanto: Marc Levin (Francio)
marc.j.levin@orange.fr
Prezidanto: Joseph van der Vleugel (Belgio)
joseph.vandervleugel@skynet.be
Sekretario: Giuseppe Grattapaglia (Brazilo)
bonaespero.brasil@gmail.com
Estrarano: Sherry Wells (Usono)
esperantosherry@tm.com
Estrarano: Leandro Freitas (Brazilo)
freitas.letras@gmail.com